

31 HISTORIO KUN INFANO

„Se oni jam parolas pri tiu komisaro Bartošek," diris sinjoro Kratochvíl, „mi rememoras kazon, kiu ankaŭ restis nekonata al la publiko; ĝi estis la historieto kun infano.

Foje alkuris al komisarejo, al tiu Bartošek, juna sinjorino, edzino de iu ŝtatbiena konsilisto, de iu sinjoro Landa, kun ega ploro, apenaŭ spirraktante. La komisaro bedaŭris ŝin, kvankam ŝi havis ŝvelan nazon kaj estis tute makula de la plorego, kaj li estis kvietiganta ŝin, kiom nur tia maljuna fraŭlo kaj krome policisto tion kapablas.

Jesumaria, juna sinjorino, li diris al ŝi, ĉesu jam, li ne forŝiros vian kapon ja, post dormo li forgesos kaj estos denove bone; kaj se li faras tro grandan skandalon, iros kun vi Hochman kaj donos al li kelkajn sur la vangon; sed vi, sinjorino, vi ne darfis doni al via edzo kaŭzon por ĵaluzo; nu kaj ĉio. - Nome, sciu, tiamaniere oni akordigas ĉe la polico plimulton da tiaj familiaj tragedioj. Sed la sinjorino nur kapskuis kaj ploris tiel, ke estis terure rigardi. Ha, mil diabloj, eksperimentis sinjoro Bartošek denove alie, li fuĝis do de vi, ĉu! Aŭdu, li revenos ja, tiu kanajlo aĉa; apenaŭ li valoras tiom, fiulo, ke vi pro li tiom ekscesu!

Si - sinjoro, ploregis la juna sinjorineto, oni ŝtelis ja de mi sur - surstrate la infanon! Ha, diris sinjoro komisaro malkonfide, kion oni farus kun la infano? Eble ĝi nur misvojis. Ŝi ne misvojis, plorsingultis la malfeliĉa panjo, Rozinja havas ja nur tri monatojn! Ho, diris sinjoro Bartošek, kiu tute ne scietis, kiam tia infano komencas iradi. Kaj kiel, mi petas vin, oni povus ŝin ŝteli de vi?

Iom post iom li eksciis tion de ŝi, kiam anticipo li ĵurlogis sin per ĉiuj ĵuroj, por kvietigi ŝin, ke la infanon certe li trovos. Ĝi estis do jene: Sinjoro Landa ĵus deĵore veturis al ŝtataj bienoj kaj sinjorino Landová volis brodi por Rozinja belan salivtuketon; kaj dum en mercerejo ŝi estis elektanta silkon por la salivtuketo, ŝi lasis stari la ĉareton kun Rozinja ekstere;

31 PŘÍPAD S DÍTĚTEM

„Když už tu je řeč o tom komisaři Bartoškoví," pravil pan Kratochvíl, „tak si vzpomínám na jeden případ, který taky nevyšel na veřejnost; to je ten případ s tím dítětem.

Tak jednou příběhla na komisařství k tomu Bartoškoví taková mladá paní, žena jednoho rady od státních statků, nějakého pana Landy, s ukrutným pláčem, že nemohla ani dechu popadnout. Tomu Bartoškoví jí bylo líto, třebaže měla zpuchlý nos a byla celá flekatá od toho usedavého pláče, a chlácholil ji, pokud to takový starý mládenec a k tomu ještě policajt dovede.

Ale ježíšmarjá, mladá paní, říkal jí, tak už toho nechte, vždyť on vám hlavu neutrhne, vyspí se z toho a bude zas dobře; a dělá-li moc velký randál, tak s vámi půjde tamhle Hochman a dá mu nějakou po hubě; ale vy, paničko, nemáte svému muži zavdávat podnět k žárlivosti; no, a je to. - Totiž, abyste věděli, tímhle způsobem na policii srovnávají většinu těchhle rodinných tragédií. Ale ta paní jen potřásla hlavou a plakala tak, že bylo hrozno se podívat. Inu, krucinál, zkoušel to pan Bartošek zase jinak, tak on vám utekl, vidíte! Poslouchejte, vždyť on se zase vrátí, ten lump mizerná; ten vám tak stojí za to, holomek, abyste pro něj tak vyváděla!

Pa-pane, zakvílela ta mladá panička, vždyť mně na-na ulici ukradli dítě! Ale jděte, řekl pan komisař nedůvěřivě, co by dělali s dítětem? Třeba se jenom zaběhlo. Nezaběhlo, štkala ta nešťastná maminka, vždyť jsou Růžence teprve tři měsíce! Aha, pravil pan Bartošek, který neměl ani ponětí, kdy takové dítě začíná chodit. A jak vám to, prosím vás, mohli ukrást?

Pomalů to z ní dostal, když předem se zaklel všemi přísahami, že to dítě určitě najde, aby ji upokojil. Tedy to bylo tak: Pan Landa zrovna jezdil úředně po státních statečích a paní Landová chtěla vyšít Růžence pěkný bryndáček; a zatímco v niřařském krámě vybírala hedvábí na ten bryndáček, nechala stát kočárek s Růženkou venku;

kiam ŝi eliris eksteren, estis Rozinja kun la ĉareto for.

Jen ĉio, kion dum pli ol duonhoro li povis elscii de la ploreganta patrino. Nu, sinjorino Landová, diris fine komisaro Bartošek, tio ne estas tiel malbona; rigardu, kial oni ŝtelus infanon? Pli ofte iam tiam oni formetas ian uleton, tian kazon mi havis jam. Mi opinias, ke tia etulo havas nenian valoron, li estas plej ofte nevendebla; sed la ĉareto havas valoron, kaj kusenoj - estis tie kusenoj, ĉu? - ankaŭ havas valoron; tia aĵo jam estas ŝtelinda. Mi opinias, ke iu ŝtelis nur la ĉareton kaj la kusenetojn; mi dirus, ke la ŝtelinto estis virino, ĉar ulo kun ĉareto estus eble iom okulfrapa. Tiu virino la infanon denove ie flankenmetos, diris Bartošek kvietige, mi petas vin, kion ŝi farus kun ŝi? Mi opinias, ke la bebeton ni alportos al vi ankoraŭ hodiaŭ, kiam oni ŝin ie trovos. Sed Rozinja havos egan malsaton, lamentis la juna patrino, jam nun ŝi devus trinki! Ni donos al ŝi trinki, promesis la komisaro, nur iru jam hejmen - Kaj li venigis iun civilan policiston, ke li konduku la povran sinjorinon hejmen.

Posttagmeze la komisaro mem sonorigis ĉe la juna sinjorino. Sinjorino Landová, li raportis, la ĉareton jam ni havas; nun mankas al ni nur la infano. La ĉareton ni trovis malplena en koridoro de ia domo, kie tute neniuj infanoj estas. Venis tien al domservistino ia sinjorino, ke ŝi volas nur mamnutri la infanon; nu, kaj poste ŝi foriris. - Damna afero, li diris kapskuante, tamen do tiu persono volis ŝteli nur la etuleton kaj nenion alian. Mi opinias, kara sinjorino, se tiu persono tiom aspiris pri la infano, ŝi neniel malutilos al ŝi, nek ŝin formanĝos; mallonge, vi povas esti senzorga kaj jen ĉio. Sed mi volas rericevi mian Rozinjan, kriis sinjorino Landová malespere. Sinjorino, vi devas doni al ni foton aŭ priskribon de via infano, diris la komisaro ofictone.

Sed, sinjoro komisaro, ploris la juna sinjorino, sciu, infanoj ĝis la unua jaro endas ne esti fotografataj! Onidire tio ne estas bona, infano poste ne volas kreski. Hm, diris la komisaro, almenaŭ priskribu precize al ni la bebon.

když vyšla ven, byla Růženka i s kočárkem tatam.

To bylo všecko, co za dobrou půlhodinu mohl z té vzlykající maminky vyzvědět. No tak, paní Landová, řekl konečně komisař Bartošek, ono to nebude tak zlé; koukejte se, kdopak by kradl dítě? To se spíš nějaký harant sem tam odloží, takový případ jsem už měl. Já myslím, že takové mrně nemá žádnou cenu, ono se to nedá většinou prodat; ale kočárek má cenu, a peřinky - byly tam peřinky, že? - taky mají cenu; taková věc už stojí za ukradení. Já myslím, že někdo ukradl jenom ten kočárek a ty peřinky; řekl bych, že to byla ženská, protože chlap s kočárkem by snad byl trochu nápadný. Tak ona ta ženská to dítě zas někde pohodí, řekl ten Bartošek chlácholivě, prosím vás, co by s ním dělala? Já myslím, že vám to nunátko ještě dnes přineseme, až se někde najde. Ale když bude mít Růženka takový hlad, bědovala mladá maminka, ona už teď měla pít! My jí dáme napít, sliboval komisař, jenom už jděte domů - A zavolal jednoho civilního, aby tu chudáka paní dovedl domů.

Odpoledne zazvonil sám komisař u té mladé paní. Tak, paní Landová, hlásil, kočárek bychom už měli; teď nám chybí jen to dítě. Ten vozeček jsme našli prázdný na chodbě jednoho domu, kde ani žádné děti nejsou. Ona tam přišla k domovnici jedna paní, že chce jenom nakojit dítě; no a potom odešla. - Zatrápená věc, povídal kroutě hlavou, tak přece jenom ta osoba chtěla ukrást to škrvně a nic jiného. Já myslím, milá paní, když ta osoba o to děcko tak stála, že je nijak nepoškodí ani nesní; zkrátka můžete být bez starosti, a je to. Ale já chci dostat svou Růženku zpátky, křičela paní Landová zoufale. Tak to nám, paní, musíte dát fotografii nebo popis toho dítěte, řekl komisař úředně.

Ale, pane komisaři, plakala ta mladá paní, to víte, děti do jednoho roku se nemají fotografovat! To prý není dobře, prý dítě pak nechce růst - Hm, řekl komisař, tedy nám aspoň to mrně přesně popište.

Tion la juna panjo faris tre detale; Rozinja havas tiel belajn harojn kaj nazeton kaj tiajn belajn okuletojn kaj pezas kvar mil kvarcent naŭdek gramojn, kaj havas tian belan postajeton kaj faldetojn sur la kruretoj Kiajn faldetojn? demandis la komisaro. Tiajn kisindajn, ploris la patrino, kaj tiajn dolĉajn fingretojn, kaj tiom ŝi ridis je la panjo - Jesuomaria, sinjorino, bruis sinjoro Bartošek, laŭ tio ni ne povas ja ŝin ekkoni! Ĉu ŝi havas ian specialan signon? Ŝi havas rozkolorajn rubandetojn sur kufeto, plorsingultis la juna sinjorino. Ĉiu knabinjo havas ja rozkolorajn rubandetojn! Je ĉiuj sanktuloj, sinjoro, trovu al mi Rozinjan! Kaj kiajn dentojn ŝi havas? demandis sinjoro Bartošek. Neniujn, ŝi estas apenaŭ tri monatojn aĝa! Se vi sciuz, kiel ŝi ridetis je la panjo! Sinjorino Landová falis sur genuojn: Sinjoro komisaro, diru, ke vi trovos ŝin al mi! Nu, ni klopodos, embarase murmuris sinjoro Bartošek. Mi petas, leviĝu! Rigardu, jen demando kial tiu persono ŝin ŝtelis. Ĉu vi povas diri al mi, por kio taŭgas tia suĉinfano?

Sinjorino Landová ekkolegis lin. Tio estas ja la plej bela en la mondo, ŝi klarigis. Sinjoro, ĉu en vi estas neniam patrinaj sentoj? Sinjoro Bartošek ne volis konfesi ĉi tiun mankon kaj rapidis diri: Mi opinias, ke tian uleton povis ŝteli nur patrino, kiu perdis propran idon kaj volas havi alian. Sciuz, estas same, kiam iu prenas en gastejo vian ĉapelon; vi elektas do alian kaj iras. Tion jam mi aranĝis: mi igis anonci, kie kaj al kiu en Prago mortis trimonata anusuleto; kaj niaj homoj iros tien rigardi, ĉu vi komprenas? Mi petas vin, laŭ tiu via priskribo ni ne ekkonos ŝin.

Sed mi ekkonos ŝin, spasme ploris sinjorino Landová. Sinjoro komisaro ŝultrolevis. Sed malgraŭ tio, li diris enpense, mi vetprenus venenon, ke tiu virino ŝtelis tiun aĉuleton pro ia materia profito. Kara sinjorino, oni tre malofte ŝtelas pro amo; plej ofte pro mono. Sed, sakre, ĉesu plori! Mi faros por vi ĉion, kion mi povas.

Kiam sinjoro Bartošek revenis al la komisarejo, li diris al siaj homoj: Aŭskultu, kiu el vi havas trimonatan kriulon?

To tedy ta maminka udělala velmi obšírně; prý má Růženka takové pěkné vlásky, a nosánek, a taková krásná očička, a váží čtyři tisíce čtyři sta devadesát gramů, a má takový krásný zadeček, a faldíčky na nožičkách. Jaké faldíčky? ptal se komisař. Takové k zulíbání, plakala ta maminka, a takové vám sladké prstíčky, a tak se vám na mámu smála – Ale ježíšmarjá, paničko, lomožil pan Bartošek, podle toho ji přece nemůžeme poznat! Má nějaké zvláštní znamení? Má růžové pentličky na karkulce, vzlykala mladá paní. Každá holčička má přece růžové pentličky! Pro všechny svaté, pane, najděte mně mou Růženku! A jaké má zuby? ptal se pan Bartošek. Žádné, vždyť jsou jí sotva tři měsíce! Kdybyste věděl, jak se na mámu smála! Paní Landová padla na kolena: Pane komisaři, řekněte, že mně ji najdete! Nu, budeme hledět, bručel pan Bartošek v rozpacích. Prosim vás, vstaňte! Koukněte se, tady je otázka, proč ji ta osoba ukradla. Můžete mně říci, k čemu slouží takový kojeneček?

Paní Landová na něho vytréštila oči. Přece to je to nejkrásnější na světě, vysvětlovala. Pane, copak ve vás nejsou žádné mateřské city? Pan Bartošek se nechtěl přiznat k tomuto nedostatku a řekl honem: Já myslím, že takového haranta by mohla ukrást jenom matka, která přišla o vlastní mládě a chce mít jiné. Víte, to je, jako když vám někdo v hospodě vezme klobouk: tak vy si vyberete jiný a jdete. Tak to už jsem zařídil: nechal jsem si ohlásit, kde komu v Praze umřel tříměsíční prcek; a naši lidé se tam půjdou podívat, rozumíte? Prosim vás, podle toho vašeho popisu ji nepoznáme.

Ale já ji poznám, vzlykala paní Landová. Pan komisař pokrčil rameny. Ale přesto, řekl zamyšleně, bych vzal na to jed, že ta ženská toho spratka ukradla kvůli nějakému hmotnému zisku. Milá paní, ono se moc málo krade z lásky; většinou to je pro peníze. Ale hergot, tak už neplačte! My vám uděláme všecko, co můžeme.

Když se pan Bartošek vrátil na komisařství, řekl svým lidem: Poslouchejte, kdopak z vás má tříměsíčního fakana?

Igu lin sendi al mi. Ia policist-edzino alportis do al li sian plej junan; sinjoro komisaro igis lin malvindi kaj diras: li estas ja malseka. Ni vidu do, haretojn sur la kapo havas kaj la faldetojn ankaŭ - ĉi tio estas la nazo, ĉu? kaj dentojn ankaŭ tio ne havas - Mi petas vin, sinjorino, laŭ kio oni ekkonas tian suĉinfanon?

Sinjorino policist-edzino alpremias sian plej junan al la brusto. Ŝi estas ja mia Manja, diris ŝi fiere, ĉu vi ne vidas, ke tute ŝi similas la patron? Sinjoro komisaro ekrigardis malcerte policiston Hochman, kiu kun hirta barbo kaj sulkiĝinta nazego grimacis al sia posteulo kaj faris per dika fingro 'tititi' kaj diris 'haf, haf, haf'. - Nu, mi ne scias, murmuris la komisaro, la nazo ŝajnas al mi iom alia, sed eble ĝi al ŝi iom elkreskos. Atendu, mi iras rigardi en parkon, kiel aspektas suĉinfanoj. Tia ĝi estas, ĉiajn poŝtelistojn kaj vagabondojn niulo tuj ekrimarkas, sed ĉi tiu frajo en kusenetoj, kun tio ni havas nenion komunan.

Post unu horo Bartošek revenis tute konsternita. Aŭdu, Hochman, tio estas ja terura, ĉiuj ĉi infanoj estas samaj! Kiel mi faru la priskribon? Estas serĉata trimonata bebeto, insekso, ŝi havas harojn, nazeton, okuletojn kaj sur la pugeto faldetojn, aparta signo: ŝi pezas kvar mil kvarcent naŭdek gramojn. Ĉu sufiĉas?

Sinjoro komisaro, diris Hochman serioze, la gramojn mi ne menciis; tia bebeto pezas foje pli kaj foje malpli, laŭ tio, kian fekaĵon li havas. Jesuomaria, lamentis la komisaro, kiel mi sciu ĉion ĉi? tio ne estas ja mia fako! Aŭdu, li diris subite faciliĝe, mi ŝarĝigus per tio ies alian kolon, ekzemple Instituton por la patrinoj kaj suĉinfanoj! Sed ni havas tion ĉi tie kiel ŝtelon, rediris la policisto. Vi pravas, murmuris la komisaro. Dio, se tio estus ŝtelita horloĝo aŭ alia prudenta objekto, pri tio mi scius konsilon; sed hometo, mi eĉ ne scietas, kiel oni serĉas ŝtelitajn infanojn!

En la sama momento malfermiĝis la pordo kaj iu policisto kondukas plorantan sinjorinon Landová.

Poŝlete mně to sem.. Tak jedna paní strážníková mu donesla své nejmladší; pan komisař si to nechal rozbalit a povídá: Vždyť je to mokré. Tak vida, chlupy na hlavě to má a faldíčky to taky má – tohle bude nos, ne? – a zuby to taky nemá – Prosim vás, paničko, podle čeho se pozná takový kojeneček?

Paní strážníková přitiskla své nejmladší k nadržům. Vždyť je to má Mánička, řekla pyšně, copak nevidíte, pane komisaři, že je to celý táta? Pan komisař se podíval nejistě na strážníka Hochmana, který se zježenými vousy a svráštělým rypákem se šklebil na svého potomka a dělal mu tlustým prstem 'tititi' a říkal 'haf haf hafáček'. – No, já nevím, bručel komisař, ten nos se mně zdá trochu jiný, ale snad jí ještě naroste. Počkejte, já se jdu podívat do parku, jak vypadají nemluvňata. To je to, všelijakých kapsářů a šupáků si našinec hned všimne, ale tenhle potěr v peřinkách, s tím přece nemáme co dělat.

Za hodinu se ten Bartošek vrátil zdrcen. Poslouchejte, Hochmane, řekl, vždyť je to děsné, všechny tyhle děti jsou stejné! Jakkak mám udělat popis? Hledá se robátko tříměsíční, ženského pohlaví, má vlásy, nosánek, očička a na prdylice faldíčky; zvláštní znamení: váží čtyři tisíce čtyři sta devadesát gramů. Stačí to?

Pane komisaři, řekl ten Hochman vážně, ty gramy bych tam nedával; on takový mrcek váží jednou víc a jednou míň, podle toho, jakou má stoličku. Ježíšmarjá, bědoval komisař, jakpak já mám tohle všechno vědět? Nemluvňata, to přece není náš referát! Poslyšte, řekl najednou s úlevou, co abychom to pověsili na krk někomu jinému, třeba Ochráně matek a kojenců! Jenže my to tu máme jako krádež, namítal ten strážník. To je pravda, bručel komisař. Bože, kdyby to byly ukradené hodinky nebo jiná rozumná věc, tak bych si s tím věděl rady; ale člověče, já nemám ani ponětí, jak se hledají ukradené děti!

V tu chvíli se otevřely dveře a jeden strážník přivádí plačící paní Landovou.

Sinjoro komisaro, li raportis, ĉi tiu sinjorino surstrate volis elŝiri suĉinfanon de iu sinjorino kaj dume ŝi faris grandan eksceson kaj skandalon. Mi do ŝin kunprenis.

Jesuokristo, sinjorino Landová, abrubtis la komisaro, kion vi faras al ni? Ŝi estis ja mia Rozinja, lamentis la juna sinjorino. Neniu Rozinja, diris la policisto. Tiu sinjorino estis sinjorino Roubalová el Budečská strato kaj la infano estas ŝia trimonata bubo. Vidu, vi malfeliĉulino, komencis tondri sinjoro Bartošek. Se ankoraŭ unufoje vi enmiksiĝos en la aferon, ni lasos tion, komprenite?

Atendu, li rememoris subite, je kia nomo aŭdas tiu via infano? Ni nomas ŝin Rozinja, plorsingultis la panjo, Suĉinjo, Dididi, buleto, birdido, ĉemizuleto, anĝeleta, paĉja, panja, malpureta, buŝeto, pisulino, skarabeto, birdeto, oro - Kaj je ĉio ĉi ŝi aŭdas? demandis la komisaro miregante. Ĉion ŝi komprenas, certigis la panjo plorante. Kaj tiom ŝi ridas, kiam ni diras al ŝi hafhaf, bububu, tidlitidli aŭ tititi - Tio ne helpas multe, opiniis sinjoro komisaro. Bedaŭrinde, mi devas diri al vi, sinjorino Landová, ni malsukcesis. En familioj, kie estis anoncita infan-morto, via Rozinja ne troviĝas; ĉion ĉi niaj homoj jam sinsekve vizitis.

Sinjorino Landová rigardis rigide antaŭ sin. Sinjoro komisaro, ŝi ekparolis en subita eklumo de espero, mi donos dek mil al tiu, kiu trovos mian Rozinjan! Anoncu premion, ke tiu, kiu alkondukos vin al spuroj de mia infano, ricevos dek mil!

Mi ne farus tion, kara sinjorino, diris sinjoro Bartošek dubeme. Vi estas senkora, eksplodis la juna sinjorino. Mi donus la tutan mondon por mia Rozinja! Nu, kiel vi volas, murmuris sinjoro Bartošek ĉagrenite. Mi anoncos tion, nur Diomia, neniel miksiĝu al ni en tion!

Peza kazo, li ekĝemis, apenaŭ fermiĝis la pordo post ŝi. Atendu, mi scias, kio nun okazos. Kaj vere okazis: tagon post tio alportis al li tri detektivoj ĉiu po unu krieganta knabinjo, kaj unu, li estis tiu Pištora, enŝovis nur la kapon inter la pordon kaj ridaĉis. Sinjoro komisaro, ĉu tio povas esti knabeto?

Pane komisaŝi, hlásil, tahle panička chtěla jedné paní na ulici vyrvat z náručí kojence a přitom ztropila velkou výtržnost a brajgl. Tak jsem ji sebral.

Proježíšekřista, paní Landová, spustil komisař, co nám to děláte? Vždyť to byla má Růženka, kvílela mladá paní. Žádná Růženka, řekl ten strážník. Ta paní byla paní Roubalová z Budečské ulice a to dítě je její tříměsíční kluk. Tak to vidíte, vy nešťastná osobo, začal hromovat pan Bartošek. Budete-li se nám do toho ještě jednou plést, tak vám s tím praštíme, rozumíte?

Počekjte, vzpomněl si najednou, na jaké jméno slyší to vaše dítě? My jí říkáme Růženka, vzlykala ta maminka, Dudenka, Dydydy, bobček, cácorka, košiláček, andílek, tátova, mámina, bakaná, pusinka, lulánek, brouček, ptáček, zlato – A na to všechno ona slyší? ptal se komisař užasle. Ona všemu rozumí, ujišťovala maminka v pláči. A tak se vám směje, když jí říkáme hafhaf, bububu, tydlimydlí nebo tititi – To nám bude málo platné, mínil pan komisař. Já vám musím bohužel říci, paní Landová, že nám selhalo. V těch rodinách, kde bylo hlášeno dětské úmrtí, vaše Růženka není; to už naši lidé všechno oběhli. Paní Landová se dívala ustrnule před sebe. Pane komisaři, vyhrkla v náhlém záblesku naděje, já dám deset tisíc tomu, kdo mně Růženku najde! Vypište cenu, že kdo vás uvede na stopu mého dítěte, dostane deset tisíc!

Já bych to nedělal, milá paní, řekl pan Bartošek pochybovačně. Vy nemáte žádný cit, vybuchla mladá paní. Já bych dala celý svět za svou Růženku! Nu, jak chcete, bručel pan Bartošek mrzutě. Já to ohlásím, ale jen už se nám do toho propánaboha nijak neplet'te! To je těžký případ, vzdychl, sotva se za ní zavřely dveře. Počekjte, já vím, co se teď stane. Ono se to opravdu stalo: den nato mu tři tajní přinesli každý po uřvané tříměsíční holčičce, a jeden, to byl ten Pištora, strčil jenom hlavu do dveří a zubil se: Pane komisaři, nemohl by to být chlapeček?

Knabeton mi havus, kaj malkare! Jen, rezulto de la premio, insultis sinjoro Bartošek. Baldaŭ ni havos ĉi tie la tutan infan-trovitejon. Malbeninda kazo!

Malbeninda kazo, li diris al si kolerigite, dum li revenis en sian fraŭlan loĝejon. Mi ŝatus scii, kiel nun mi trovos la bebeton. Veninte hejmen, li trovis tie sian helpserviston, tian ladbuŝan virinaĉon kvereleman, kiel ŝi radias pro entuziasmo. Iru nur rigardi, sinjoro komisaro, ŝi diris anstataŭ bonvenigo, tiun vian Barinan! Sciu, sinjoro Bartošek havis de sinjoro Justitz pursangan bokshundinon, Barinan, kiu forgesiĝis al iu luphundo. Mi nur miras, ke ĉi tiuj diversaj hundspecioj entute reciproke agnoskas sin kiel hundoj; mi ne komprenas, laŭ kio tia rusa bigelo ekkonas, ke vertago ankaŭ estas hundo. Ni homoj distingiĝas nur per lingvo aŭ kredo kaj dume ni povas nin reciproke formanĝegi.

Do tiu Barina havis kun luphundo naŭ hundidojn kaj nun ĝi kuŝis ĉe ili, vostumis kaj feliĉege ridetis. Nur rigardu, laŭtvoĉis la helpservistino, kiel ĝi fieras pro la hundidoj, kiel ĝi fanfaronas pri ili, tiu bestaĉo! Nu, kiel ĉiu patrino!

Sinjoro Bartošek enpenisiĝis kaj diras: Sinjorino, ĉu vere? Ĉu la patrinoj faras tion? Nu memkomprene jes, asertis la helpservistino. Nur provu laŭdi infanon de ies patrino! Kiel interesa, murmuris sinjoro Bartošek. Atendu, ni provos tion.

Sekvintan tagon ĉiuj patrinoj en Granda Prago estis tute en ekstazo. Apenaŭ ili eliris eksteren kun infano en ĉareto aŭ surbrake, tuj estis ĉe ili uniformita policisto aŭ sinjoro en bulĉapelo, grimacis ilian ĉarman bebon kaj tiklis lin sub la mentono. Kian belan bebon vi havas, sinjorino, li diris ĝentile, kian aĝon li havas? - Nu mallonge, por ĉiuj patrinoj ĝi estis tago de ĝojo kaj fiero. Kaj jam je la dek unua matene alkondukis iu detektivo al komisaro Bartošek ian palan kaj tremantan virinon. Jen ŝi estas, sinjoro komisaro, li raportis deĵore.

Chlapečka bych měl, a lacino! Tohle máme z té ceny, nadával pan Bartošek. Pomalu tu budeme mít celý nalezinec. Ztracený případ! Ztracený případ, říkal si dopáleně, když se vracel do svého mládeneckého příbytku. To bych rád věděl, jak to mrně teď najdeme. Když přišel domů, našel tam svou posluhovačku, takovou princmetálovou bábu hubatou, jak nadšením září. Jen se pojd'te podívat, pane komisaři, povídala místo uvítání, na tu vaši Barynu! Abyste věděli, ten pan Bartošek měl od pana Justitze čistokrevnou fenu boxerku, Barynu, která se zapomněla s nějakým vlčákem. Víte, já se jen divím, že se tyhle různé druhy psů vůbec navzájem uznávají za psy; já tomu nerozumím, podle čeho takový barzoj pozná, že jezevčík je taky pes. To my lidé se lišíme jenom jazykem nebo vírou, a přitom se můžeme navzájem sežrat.

Teda ta Baryna měla s tím vlčákem devět štěňat, a teď u nich ležela, vrtěla ocáskem a blaženě se usmívala. Jen se podívejte, hlalolila ta posluhovačka, jak ona je na ty štěňata pyšná, jak se s nima chlubí, ta mrcha! Inu, jako každá máma!

Pan Bartošek se zamyslel a povídá: Matko, je to pravda? Dělalí to mámy? No japabyne, prohlásila ta posluhovačka. Jen to zkuste pochválit nějaké mámě její dítě! To je zajímavé, bručel pan Bartošek. Počkejte, to zkusíme.

Tak den nato vám byly všechny matky ve Velké Praze přímo u vytržení. Jak vyšly ven s dítětem v kočárku nebo v náručí, už byl u nich uniformovaný policajt nebo nějaký pán v buřince, šklebil se na to jejich rozkošné děťátko a dělal mu šmik šmik pod bradou. To máte hezké diťátko, paní, říkali přívětivě, jakpak je staré? No zkrátka byl to pro všechny maminky den radosti a pýchy. A už v jedenáct ráno přivedl jeden tajný ke komisaři Bartoškovi takovou bledou a třesoucí se ženskou. Tak tady jí máme, pane komisaři, hlásil služebně.

Mi renkontis ŝin kun ĉareto, kaj kiam mi diris al ŝi, ajaj, vi havas ĉarman bebon, kian aĝon li havas? - ŝi ekrigardis min kolere kaj kaŝis la infanon post la kurtenetojn. Mi diris do al ŝi, iru kun mi, sinjorino, kaj ne bruu.

Venigu sinjorinon Landová, diris la komisaro. Kaj vi, persono, pro Kristsinjoro, diru al mi, kial vi ŝtelis la infanon! Tiu ulino nelonge neis, tuj ŝi konfuziĝis. Ŝi estis needziniĝinta junulino kaj havis knabinjon kun iu sinjoro. La infano en lastaj tagoj malsanis je stomako kaj du noktojn kriis. La trian nokton donis tiu virino al ŝi mamtrinki en la lito kaj dume ŝi ekdormis; kiam matene ŝi vekigis, estis la infano blua kaj morta. Mi ne scias, ĉu tio estas ebla," diris sinjoro Kratochvíl kun ia dubo. „Ebla ĝi estas," enmiksiĝis en lian parolon doktoro Vitásek. „Unue, la patrino ne satdormis; due, la infano havis versimile kataron kaj kelkajn tagojn rifuzis la mamon. Tial la mammo estis tro peza, kaj kiam la patrino ekdormis, ĝi glitis sur la nazeton de la infano kaj la infano sufokiĝis. Tio ankaŭ povas okazi. Do plue!"

„Eble do tiel ĝi estis," daŭrigis sinjoro Kratochvíl. „Kiam matene la virino vidis, ke ŝia infano estas morta, ŝi iris anonci tion al parohejo; sed dumvoje ŝi vidis la ĉareton de sinjorino Landová, kaj tiam ŝi ekhavis ideon, se ŝi havos alian infanon, tiu sinjoro pagos al ŝi plu la alimentojn. Krome, laŭdire," diris sinjoro Kratochvíl embarase kaj ruĝiĝis: „la lakto tro premis ŝin." Doktoro Vitásek jesis. „Ankaŭ tio estas vero," li diris. „Sciu," senkulpigis sin sinjoro Kratochvíl, „tiajn aferojn mi ne komprenas. Tial ŝi ŝtelis la infanon kun la ĉareto kaj la ĉareton poste ŝi lasis stari en koridoro de fremda domo; kaj Rozinjan ŝi forportis hejmen anstataŭ sia Zdenja. Sed cetere ŝi estis ia frenezeta aŭ stranga virino, ĉar sian mortan infanon dume ŝi metis en glaciŝrankon; laŭdire, nokte ŝi volis ŝin ie enterigi aŭ formeti, sed ne havis por tio kuraĝon.

Dume venis sinjorino Landová Jen, juna patrino, diras al ŝi sinjoro Bartošek, jen vi havas vian bebinjon.

Já ji potkal s kočárkem, a když jsem jí řekl, jejej, to máte rozkošné dítě, jakpak je staré? - tak vám po mně tak zle střelila očima a schovala dítě za záclonky. Tak jsem jí řekl, pojd'te se mnou, paničko, a nedělejte rámus.

Skočte pro paní Landovou, řekl komisař. A vy, osobo, mně prokristapána řekněte, proč jste to dítě ukradla! Ta osoba ani dlouho nezapírala, hned se spletla. Byla vám to svobodná holka a měla holčičku s jedním pánem. To dítě jí poslední dny trochu stonalo s bříškem a dvě noci křičelo. Třetí noc mu ta ženská dala v posteli prs a přitom usnula; a když se ráno probudila, bylo prý to dítě modré a mrtvé. Já nevím, jak je to možné," pravil pan Kratochvíl s jakousi pochybností. „Možné to je," vmíchal se mu do řeči doktor Vitásek. „Předně byla ta matka nevyspalá; za druhé to dítě asi mělo katar a pár dní odmítalo prs. Proto byl ten prs příliš těžký, a když ta matka usnula, svezl se dítěti na nosejček a dítě se udusilo. To se konečně může stát. Tak dál."

„Snad tedy to tak bylo," pokračoval pan Kratochvíl. „Když ráno ta ženská viděla, že její dítě je mrtvé, šla to hlásit na faru; ale cestou viděla ten kočárek paní Landové, a tu jí napadlo, když bude mít jiné dítě, že jí ten pán bude platit alimenty dál. Krom toho prý," řekl pan Kratochvíl rozpačitě a začervenal se, „ji hrozně tlačilo mlíko." Doktor Vitásek přikývl. „To taky je pravda," řekl. „To víte," omlouval se pan Kratochvíl, „v těch věcech se já nevyznám. Tedy proto ukradla to dítě s kočárkem a ten kočárek pak nechala stát v chodbě cizího domu; a tu Růženku si odnesla domů místo své Zdeničky. Ale ona to musela být nějaká bláznivá nebo divná ženská, protože to své mrtvé dítě dala zatím do ledničky; prý je chtěla v noci někde zakopat nebo položit, ale neměla k tomu odvahu.

Zatím přišla ta paní Landová. Tak, mladá maminko, povídá jí pan Bartošek, tady máte to své mrně.

SinJORINO Landová dronis en larmoj. Tio ne estas ja mia Rozinja, ŝi hastdiris, Rozinja havis alian kufeton! Tondro al tio, ekkriis la komisaro, malvindu ŝin! Kaj kiam ŝi kuŝis sur lia skribotablo, li levetis ŝin je la piedetoj kaj diris: Rigardu nur, kiajn faldetojn ŝi havas sur la postajeto! Sed tiam sinJORINO Landová jam genuis sur la tero kaj kisis la manetojn kaj piedetojn de la etulino. Ci mia Rozinja, ŝi kriis plorante, ci birdeto! Dididi, ci fieta, ci panja pugeto, ci mia oro - Mi petas vin, sinJORINO, diris sinJoro Bartošek ĉagrenite, ĉesu, alie, je mia animo mi edziĝos. Kaj la dek mil donu por la needziniĝintaj patrinoj, ĉu vi komprenas? SinJoro komisaro, diris sinJORINO Landová solene, braklulu la infanon kaj benu ŝin! Ĉu tio devas esti? murmuris sinJoro Bartošek. Kiel oni tion prenas? Ha. Rigardu, ŝi komencas plori! Jen, prenu ŝin rapide. Kaj tio jam estas fino de la historio kun infano."

Panĭ Landovou polily slzy. To prece neni mĀ Růženka, vyhrkla, Růženka mĕla jiný ĉepeĉek! Hrom do toho, křikl komisař, rozbalte to! A když to leželo na jeho psacím stole, pozvedl to za nožičky a řekl: Tak se podívejte, jaké to má na zadečku faldíčky! Ale to už panĭ Landová kleĉela na zemi a líbala tomu škvnrĕti ruĉičky a nožičky. Ty má Růženko, křičela v plāĉi, ty ptāĉku, Dydydy, ty bakanā, ty mĀmina prcinko, ty mĕ zlato – Prosím vĀs, panĭ, řekl pan Bartošek mrzutĕ, přestaňte, nebo se na mou duši ožením. A tĕch deset tisíc dejte na nemanželské matky, rozumíte? Pane komisaři, řekla panĭ Landová slavnostnĕ, pochovejte to dĭtĕ a požeňte mu! Musí to bĭt? bruĉel pan Bartošek. Jak se to bere? Aha. Ale koukejte, ono to začínā breĉet! Nate, vemte si to honem! A to už je konec toho pŕĭpadu s dĭtĕtem."